



9(115)  
2009

# Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

Bultenon redaktas: ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO  
Adreso por korespondi: ul. I.Krasickiego 18-20, PL 31-515 Kraków

Wisława Szymborska

## Pociecha

Darwin.  
Podobno dla wytchnienia czytywał powieści.  
Ale miał wymagania:  
nie mogły kończyć się smutno.  
Jeśli trafił na taką,  
z furią ciskał ją w ogień.

Prawda, nieprawda –  
ja chętnie w to wierzę.

Przemierzając umysłem tyle obszarów i czasów  
naoglądał się tyłu wymarłych gatunków,  
takich tryumfów silnych nad słabszymi,  
tak wielu prób przetrwania,  
prędzej czy później daremnych,  
że przynajmniej od fikcji  
i jej mikroskali  
miał prawo oczekiwać happy endu.

A więc koniecznie: promyk spoza chmur,  
kochankowie znów razem, rody pogodzone,  
wątpliwości rozwiane, wierność nagrodzona,  
majątki odzyskane, skarby odkopane,  
sąsiedzi żałujący swojej zawziętości,  
dobre imię zwrócone, chciwość zawstydzona,  
stare panny wydane za zacnych pastorów,  
intryganci zesłani na drugą półkulę,  
fałszerze dokumentów zrzućeni ze schodów,  
uwodziciele dziewic w biegu do ołtarza,  
sieroty przygarnięte, wdowy utulone,  
pycha upokorzona, rany zagojone,  
synowie marnotrawni proszeni do stołu,  
kielich goryczy wylany do morza,  
chusteczki mokre od łez pojednania,  
ogólne śpiewy i muzykowanie,  
a piesek Fido,  
zgubiony już w pierwszym rozdziale  
niech znów biega po domu  
i szczeka radośnie.

## La konsolo

Darwin  
ŝajne por ripozi legadis romanojn.  
Sed li estis postulema:  
ili ne rajtis finiĝi malĝoje.  
Se li trafis tian,  
furioze ĵetadis ĝin fajren.

Vero, malvero  
mi volonte kredas je tio.

Mense trapaŝante tiom da spacoj kaj tempoj  
li rigardis tiom da mortintaj specioj,  
tiajn triumfojn de fortuloj super febluloj,  
tiom multajn provojn transdaŭri,  
pli frue aŭ malpli frue vanajn,  
ke almenaŭ de fikcio  
kaj ĝia mikroskalo  
rajtis atendi la feliĉan finon.

Kaj do nepre: radieto ekster nuboj,  
geamantoj denove kune, gentoj repacigitaj,  
duboj disblovitaj, fideleco kun rekompenco,  
bienioj reatingitaj, trezoroj elfositaj,  
najbaroj bedaŭrantaj sian obstinecon,  
la bona nomo redonita, avidemo en honto,  
maljunaj fraŭlinoj - edzinoj de honestaj pastoroj,  
intrigantoj deportitaj al la dua duonglobo,  
falsistoj de dokumentoj deĵetitaj de ŝtuparo,  
delogantoj de virgulinoj kurantaj al altaro,  
georfoj kore akceptitaj, vidvinoj kvietigitaj,  
orgojlo humiligita, vundoj cikatrigitaj,  
malŝparemaj filoj invititaj al la tablo,  
la kaliko da amaro forverŝita en maron,  
nastukoj malsekaj pro larmoj de repaciĝo,  
ĝeneralaj kantado kaj muzikado,  
kaj hundeto Fido  
perdiĝinta jam en la unua ĉapitro  
denove kuru tra la hejmo  
kaj boju ĝoje.

# Krakova Societo Esperanto

## La programo de la renkontoj decembre

<b>02.12</b>	Lidia Ligeza Bronisław Kieres	<b>Raporto pri la 94-a Universala Kongreso en Bjalistoko parto II</b>
<b>09.12</b>	Lidia Ligeza Bronisław Kieres	<b>Raporto pri la 94-a Universala Kongreso en Bjalistoko parto III</b>
<b>16.12</b>	Lidia Ligeza	<b>La decembraj kutimoj en Pollando</b>

## La 70-a datreveno de eksplodo de la dua mondmilito (2)

Pri malvenko decidis la ekonomia kaj milita malforteco de pola ŝtato en batalo kontraŭ du potencaj najbaroj kaj nedecidemo de aliancoj. Malgraŭ tio la rezisto de Pollando finis la pacan ekspansion de Tria Regno kaj devigis okcidentajn potencojn komenci la militan agadon kontraŭ hitlerismo.

La dua mondmilito, kaŭzita de germana Tria Regno per atako kontraŭ Pollando en 1939 estis la plej granda kaj plej sanga milita konflikto dum historio.

Partoprenis ĝin 61 ŝtatoj, kaj la senperaj militaj agadoj tuŝis ŝtatoj de tri kontinentoj: Eŭropo, Azio kaj Afriko. Mobilizitaj estis kune pli ol 110 milionoj da soldatoj. Bilanco de la milito - egale la homaj pereoj kaj ekonomiaj perdoj - atingis la ne konatan ĝis nun grandecon. Kvankam la preciza difino de nombro de perditoj kaj mortigitoj ne eblas, sed oni akceptas ĝin je pli ol 35,5 milionoj da viktimoj.

Plej dolore post Sovetunio estis tuŝita Pollando. La homaj pereoj atingis kune ĉirkaŭ 5,8 milionoj da personoj – kalkulante viktimojn de la germana kaj la sovetia okupoj – en tio ĉirkaŭ 2,7 milionoj da judoj pereis dum la holokaŭsto.

La finon de la dua mondmilito en 1945 j. antaŭis la principaj decidoj pri estonteco de la postmilita mondo, kiuj okazis dum konferencoj de venkintaj potencoj en Teherano, Jalto kaj Potsdamo.

Oni faris teritoriajn ŝanĝojn kaj la dividon de Eŭropo kaj de la mondo je zonoj de influo. Zorgante pri daŭrado de antihitlerana koalicio kune kun Sovetunio, Winston Churchill, kiu prezentis Brition dum la konferenco de t.n. Granda Trio en Teheran novembre 1943 konsentis kun silenta aprobo de usona prezidento Franklin Roosevelt je la proponita de Josif Stalin determino de pola orienta linio laŭ t.n. Curzon-linio. Laŭ tiu ĉi propono, al Pollando inkluzivitaj estis Orienta Prusio (sen Königsberg) kaj Opole-regiono de okcidenta limo laŭ rivero Odra, tamen dum la moskva renkontiĝo de Churchill kun Stalin oktobre 1944 estis preparolita sorto de baltaj landoj kaj Pollando. Estontecon de Litovio, Latvio kaj Estonio oni agnoskis kiel internan aferon de Sovetunio. La jalta konferenco, kiu debatis februare 1945 kaj la pli posta, okazinta jam post kapitulacio de Germanio en Potsdamo – alportis pluajn decidojn de la tri potencoj koncerne de la postmilita ordo. En Jalto oni decidis i.a. pri dispartigo de Germanio je okupaciaj zonoj, pri la senarmigo, pri punado de la militaj krimuloj, pri militaj reparacioj kaj pri ŝovado okcidente kaj norde de polaj limoj.

Pollando interŝanĝe kontraŭ la decido pri orienta limo laŭ Curzon-linio profitis kiel rekompenco pligrandigon de sia teritorio okcidente kaj norde. Dum la lasta konferenco de Granda Trio en Potsdamo julie 1945 oni cedis al pola administracio la eksajn germanajn teritoriojn situantaj oriente de riveroj Odra kaj Nysa, urbo Gdansko kaj la sud-okcidentan parton de Orienta Prusio (sen Königsberg) kaj apudaj teritorioj transprenis Sovetunio.

Krome, la aliancitaj potencoj decidis la devigan elloĝigon de la germana loĝantaro el Pollando, Ĉeĥoslovakio kaj Hungario kaj la politikajn kaj ekonomiajn regulojn de la okupacia politiko en Germanio. Inter ili troviĝis denazigado, senarmigo, malkarteligo, demokratigo kaj decentralizo de la politika sistemo. Post fino de la dua mondmilito la Ruĝa Armeo restigis en Pollando. En unuaj jaroj post 1945 restadis 300 – 400 mil da soldatoj, kiuj ankaŭ kontrolis lojalecon de pola aliancano kadre de la Varsovia Pakto.

La okupacio komencita en 1939 j., ŝanĝita poste en la staton de limigita suvereneco daŭris 54 jarojn. Lastaj sovetiaj taĉmentoj forlasis polan teritorion la 17-an de septembro 1993 . La solenaĵo de eksplodo de la dua mondmilito koincidas kun memoro pri datreveno de la fino de komunismo. Jaro 1989 estas por poloj jaro de reaktiro de subiekteco kaj propra progresiva vojo, konstruado de nacia identeco kaj la sistemaj ŝanĝoj ĉe malkonsento pri ĉiuj provoj skribi denove historion.

*Benedykt Wilkowitz*

*tradukis: Zbigniew Duda*

## **Kongreso en Vroclavo**

Ĉi jara, 19-a Ekumena Esperanto-Kongreso, 62-a de IKUE kaj 59-a de KELI okazis en Vroclavo inter 18 - 25. de julio 2009. Partoprenis ĝin 232 personoj el 20 landoj. La plej nombra estis pola grupo (75), poste sekvis litovanoj (27) kaj rumanoj (23). Renkontiĝis katolikoj, protestantoj, ortodoksoj. Nia grupo el Krakovo kaj Krzeszowice nombris 11 personoj.

La Kongreso okazis en la Propastra Alta Seminario situanta en la plej malnova kvartalo de Vroclavo - Ostrów Tumski. Niaj loĝejoj ankaŭ troviĝis tie. La solena malfermo de la Kongreso okazis dimanĉe posttagmeze en la barokstila, belega aŭlo "Leopoldina" en Vroclava Universitato. Elpaŝis pluraj elstaraj eminentuloj aŭ reprezentantoj de ili: aŭtoritatoj de la urbo, legatoj de Eklezioj. Kongresa temo estis: "... fido, espero kaj amo, tiuj tri ( 1 Kor 13,13) espero kristana aŭ monda senespero". Tiu temo revolviĝis en elpaŝoj de prelegantoj. Fido, espero kaj amo- la tri virtoj pere de kiuj ni, kristanoj celas al unuiĝo kun Dio kaj ankaŭ alproksimiĝas al si reciproke. Kongresaj prelegoj rilatis ne nur al la ĉefa temo, sed tuŝis diversajn aliajn problemojn, kiel religio kaj geologio aŭ vivagado de grandaj kristanoj- Albert Schweitzer, pastoro Bonhoeffer, Patrino Tereza kaj sankta Francisko.

Programo de la Kongreso ankaŭ ne koncernis nur al la gvidata temo. Krom la tempo, kiun ni dediĉis al preĝoj en sanktejoj de diversiaj kristanaj konfesioj, ni havis ankaŭ okazon distri dum diverstemaj kulturaj programeroj, kiuj vere abundis. Ankoraŭ dimanĉe nia Jadwiga Dziegielewska kun akompano de Grażyna Nazarko kantis kanzonojn el sia riĉa repertuaro, vekante varmegan aplaŭdon de la publiko. Ŝi estis devigita kelkfoje bisi. Elpaŝis ankaŭ "knabo el Sosnowiec" Jerzy Walaszek kaj Paweł Salik el Vroclavo. Ili kantis italajn ariojn kaj kanzonojn. Helpis al ili Wojciech Ławnikowicz, blinda junulo, kiu poste ankaŭ kantis kun akompano de gitaro. Li kantis kun sento kaj ankaŭ ricevis meritajn aplaŭdojn.

Merkrede, en la evangelia-luterana kirko de Dia Providenco ni aŭskultis orgenan koncerton, kiun realigis Ernst Leuze, elstara orgenludisto. Ni rekompencis artiston per longa tondra aplaŭdo.

Jaŭde ni havis okazon aŭdi kaj admiri la faman Jo-Mo, francan kanzoniston kaj esperantiston. Li kantis multlingve, scipopante movigi kaj varmigi la publikon ĝis la plena kortuŝo kaj ĝojo.

Krom koncertoj ni partoprenis en ege valoraj ekskursoj. Lunde ni vizitis la urbon kaj vespere ni ĝuis perŝipan ekskurson laŭlonge de rivero Odra admirante iluminitan urban bordon. Jam tradicie, merkredo estis dediĉita al ĉiutaga ekskurso. Ni vizitis sileziajn urbojn: Świdnica, Książ kaj Szczawno Zdrój.

En Świdnica ni vizitis Kirkon de Paco, la grandan lignan preĝejon, unikan en la eŭropa skalo, devenantan de XVII j. Konstruita post la Tridekjara Milito per luteranoj, estis subordigita al severa leĝo rilatanta al protestantoj. La kirko estis konstruita ekster la urbomuroj kaj por ĝia konstruo oni permesis uzi nur malfirmajn materialojn kiel: argilo, sablo, pajlo, pecligno. Tamen dank'al arkitektoj kaj konstruantoj fascinas ne nur ekstero, sed ankaŭ riĉe kaj originale ornamita interno, kiu povas arigi ĉ. 7000 personoj. Troviĝas tie ankaŭ riĉa luterana arkivo kun altvaloraj manuskriptoj, biblioj kaj grafikajoj. Poste ni eniris la katolikan katedralon, ankaŭ gotikan, kie ni partoprenis sanktan meson.

Sekve, ni forveturis al Książ, granda kastelo, la plej granda en Silezio kaj tria laŭ la grandeco en Pollando. En XIII j. konstruis tie sian kastelon princo de Świdnica - Bolko I. Poste la kastelo trairedis al

diversaj posedantoj, fine dum 400 jaroj ĝis la II mondmilito, ĝi estis proprietaĵo de familio Hochberg. Vizitante nur la unuan etaĝon, ni povis konvinki, ke vere ĝi estis magnata posedado.

Finfine ni alvenis al Szczawno -Zdrój, konata de XIX.j. kuraĉloko, fama pro mineralaj akvoj. Kuracis ankaŭ tie L.L. Zamenhof. En la bela, ampleksa parko troviĝas memoriga ŝtono dediĉita al la Majstro, kie ni metis bukedon da floroj. Klopode de la loka esperantistaro ni havis okazon aŭskulti en la koncerta konko distran programon, ankaŭ parte en E-o. La urbestro donacis al ni diversajn turismajn materialojn pri la urbo.

Vroclavo mem estas ege interesa. La granda, malnova urbo kun multnombraj sakralaj objektoj, konstruaĵoj dediĉitaj al scienco, kulturo kaj arto, tre vigla, alportis al ni neforgeseblajn impresojn. Bonega organizado, tre bongusta manĝado, amika etoso, signife influis al nia bona animstato. Ni dankas kore al la tuta loka kongresa komitato, ĉefe ni dankas al Teresa Pomorska, kaj Stanisław Śmigielski.

*Anna Kołpanowicz*

## **Vojaĝo al Bornholm**

Nia vojaĝo de haveno Kołobrzeg al haveno Nexø sur insulo Bornholm en Danlando daŭris nur tri horoj kaj duono. La maro estis trankvila, de tempo al tempo brilis la suno. En la haveno Nexø atendis nin interurbaj busoj. Ni ne havis pli frue rezervitajn lokojn, sed kelkaj lokoj estis liberaj kaj ni uzis la okazon. La ekskurso kostis nur 50 zlotojn pro persono. La restado sur la insulo daŭris ses horojn. Ni vizitis tri urbetoj: Osterlars Kirke, Gudhjem kaj Hammershus norde de la insulo. En Osterlars troviĝas malnova, malgranda kirketo en formo de rotundo, konstruita en romanika stilo en 1150 kaj portanta nomon de sankta Laurentus. La rotundo havas tri fenestretojn kaj la lumo enirante trans ili, kreas brilan, mirinde aspektantan triangulon ene de la kirketo. Sur la insulo loĝas 90% da protestantoj, sed nur malmulte de ili frekventas diservojn, pro tio, ke oni devas pagi eklezian imposton kaj nur 40% de la loĝantoj anoncas sin kiel praktikantaj evangelianoj. Malproksime de la preĝejo mi vidis lokan tombejon. La tombejo estas sen tombaj monumentoj, sen kandeloj. Nur troviĝas ŝtonaj memortabuloj kun cizitaj nomoj kaj datoj de morto. La mortinto estas eksponita antaŭ domo unu- du tagoj kaj poste cindrounita.

Loĝdomoj estas teretaĝaj kun apudhejmaj ĝardenetoj. Ilia stilo estas legalizata de la ĉefarkitekto. Tute ne ekzistas “konstruata memvolo”, kiu regas ĉe ni enlande. Satelitaj antenoj ne elstaras sur tegmentoj, sed lokigitaj estas proksime al la tero. Loĝantoj mem bakas panon uzante proprajn bakfornojn. Aĉetitaj en butikoj pano, kolbaso, ŝinko ne estas bongustaj. Pano estas multekosta. Ekzemple unu kilogramo da maizkarota pano kostas ok zlotojn. Pano kaj seka kolbaso el Pollando estas vera raraĵo por danoj. En la havena urbeto Gudhjem mi vidis apud domojn fornfumaĵojn por fiŝoj. En unu vendejo kun artistaj vitralproduktaĵoj mi observis kiamaniere tri laboristinoj preparigas produktadon de vitraj suveniroj. La lasta loko estis Hammershus. Ni vizitis ruinaĵon de la grandega malnova kastelo de XI jarcento konstruita sur la malgranda monteto apud la maro. Jam inter XVI – XVII j. oni agnoskis ĝin kiel historian monumenton. Pli frue la loka loĝantaro malkonstruis la kastelon kaj ties brikoj uzis por propraj domoj. Nun en la kastelo estas rekonstruitaj ĉambroj, kiuj antaŭ jarcentoj servis kiel kuirejo, banejo, subtera prizono aŭ torturejo. Digresio- ĉie en vizititaj lokoj oni ne devas pagi por uzado de necesejo. Ili estas puraj kun varma akvo ktp. sen ”klozetavinoj”.

Jen kelkaj interesaj faktoj de ĉiutaga vivo. Infanoj estas harditaj jam de suĉinfanaĝo. Ili ne povas manĝi facile digesteblajn supojn, legomojn sed oni donas al ili panon, heringojn, krudaĵojn. Gelernantoj ĝis la 7-a klaso multe amuziĝas kaj ekskursas, En lernejo estas devige trinki unu glason da lakto. Danoj multe zorgas pri dentoj de infanoj. Gejunuloj, kiuj finis 18 jarojn malofte kontaktiĝas kun gepatroj, prefere nur dum festotagoj kaj familiaj festoj. Gepatroj ne subtenas ilin finance. Pensiuloj post 70-a vivjaro estas plene vivtenataj de la ŝtato. En la “hejmo de trankvila maljuneco” ĉiu senioro(ino) ricevas 2 ĉambrojn, kuirejon, banĉambron, televidilon, fridujon kaj plenan medicinan prizorgon. Pensiuloj ricevas bonan pension kaj povas forveturi eksterlanden.

*Anna Ramza*